

BELGA ESPERANTO-FEDERACIO

19 OKT.



Somoroilo

57a jaro n° 4
Julio - agosto - septembro

1965

Sonorilo


oficiala dumonata bulteno de B.E.F.

Redakcio: JAUMOTTE MAURICE
ROOSE FERNAND, SINT-KLARAAREEF 59, BRUGGE TEL. (050) 319.81
MAERTENS GRÉGOIRE
POUPEYE CHARLES

Kunlaborantoj al regulaj rubrikoj:

DR. POL DENOËL DURWAEL IVO ISERENTANT ROGER

Administrado: TERRYJ. RAAPSTRAAT, 72 GENT



ASOCIO SEN PROFITA CELO

SIDEJO & PREZIDANTEJO

DEBROUWERE GERARD, MAGDALENASTRAAT 29 KORTRIJK TEL. (03) 377758

HONORA PREZIDANTO

KEMPENEERS PAUL

HONORA VICPREZIDANTO

SIELENS HENRI

ĜENERALA PREZIDANTO

JAUMOTTE MAURICE

HONORA VICPREZIDANTINO

PLYSON J.

PREZIDANTOJ

DEBROUWERE GERARD, MAGDALENASTRAAT 29 KORTRIJK
DRO DENOËL POL, 20 RUE V. RASKIN LIÈGE

UNUA VICPREZIDANTO

ROOSE FERNAND

VICPREZIDANTO FAKESTRO PRI TEKNIKAJ RIMEDOJ

VERSTRAETEN JULES, SINT BERNARDSE STEENWEG 1078 HOBOKEN

ĜENERALA SEKRETARIO

DE ROOVER R., LUCHEVAARTSTRAAT 28 BORGERHOULT

SEKRETARIO POR LA NEDERLANDINGVA REGIONO

MAERTENS GRÉGOIRE, PRINS LEOPOLDSTER 51, ST-KRUIS TEL. (050) 34935

SEKRETARIO POR LA FRANCLINGVA REGIONO

DE CUYPER GEORGES, 66, RUE DE DORLIDOT, MONCEAU SUR SAMBRE

KASISTINO

TERRYJ. JULIETTE, RAAPSTRAAT 72, GENT

poŝtkonto de B.E.F.: 1634.34 RAAPSTRAAT, 72, GENT

Ĉefdelegito de universala esperanto-asocio

FR. SCHELLEKENS, FRANS HENSSTRAAT, 44, ANTWERPEN 2
P.K. 9051.25

DONACO DE KVINDEK MIL FRANCOJ

Celo: Starigo de speciala « **Fondaĵo por la Propagando** »

Tiuj, kiuj ĉeestis la Kongreson en Oostende, jam scias, — kaj la aliaj povas legi en la raporto pri tiu Kongreso —, ke estis tie honorigitaj gesinjoroj M. JAUMOTTE-LOQUET, pro donaco de 50.000 fr. de ili farita, okaze de ilia 65-jara aĝjubileo.



Laŭ la ideo de la donacintoj, la ĉiujara rentumsumo devos esti uzata por propagandaj celoj, laŭ propono de administra komisiono de starigota « Fondaĵo », al kies pligravigo ĉiuj en nia lando ekzistantaj organizaĵoj kaj individuaj esperantistoj, ne nur povos, sed estos vigle invitataj partopreni; eĉ se la ĝiro rilatos nur al eta sumo.

La donacintoj esperas ke tiel baldaŭ la belga esperanto-movado povos disponi, — ekster la ĉiam tre limigitaj kotizumoj —, pri iu grava helpilo por la ĝenerala propagando.

Dum kaj tuj post la Kongreso jam sin anoncis unuaj kun-donacontoj, kiuj volas kontribui al la starigo de tia, ĉiam plivastiĝanta kapitalo.

La unuaj, — ankoraŭ dum la Kongreso, — estis G-roj G. Debrouwere, kiuj tuj promesis donaci 5.000 fr. Intertempe ankaŭ nia Federacio decidis kontribui per sumo de 25.000 fr., dum la Antverpena Grupo « La Verda Stelo » jam ensendis 2.000 fr.

Ankaŭ S-ino R. Lecat (Antverpeno), kiu intencis testamente donaci al BEF: 10.000 fr. decidis, jam ekde nun, fari la donacon per ĉiujaraj ĝiroj de 1.000 fr.

Diversaj aliaj grupoj kaj ankaŭ individuaj membroj promesis financan subtenon; sed tiujn ni kvitancos en la sekvonta numero de nia Revuo.

HET WELGEKEND
MAGAZIJN VOOR MODERNE HERENKLEDING



in't duifken

GROTE KEUS
IN GEREDE KLEDING.

KOSTUMEN - SPORTJASSEN - BROEKEN
UNIFORMEN - GABARDIENEN - LODENS
STIJLVOL MAATWERK

KOEPOORTSTRAAT 64-66, ANTWERPEN

RABATO POR ESPERANTISTOJ

Laŭ propono de nia ĝenerala prezidanto, G-roj M. Jaumotte deziras resti nur la « fondintoj » de la Fondaĵo, sed ne enmiksiĝi en la administrado, prizorgota de komisiono, kiu konsistas el la du regionaj prezidantoj S-roj G. Debrouwere kaj D-ro Denoël, kaj la du regionaj sekretarioj : S-roj G. de Cuyper kaj G. Maertens, kiu lasta certigos la administradon kaj proponos la financajn « placigojn ».

Sed, nun jam, la tuta akirita kapitalo estas metita je dispono de la Eldonejo « Sonorilo » kaj de « Heroldo de Esperanto », kiuj garantias netan 7 %-an rentumon, pagotan je fino de junio kaj de decembro de ĉiu jaro. Tiel la kapitalo kaj la rentumo helpados la movadon !

Ĉiuj certe akordiĝos, se ankaŭ ni plej kore dankos nian ĝeneralan prezidanton kaj S-inon M. Jaumotte, pro la escepte grava iniciato, kaj ĉiujn jam kunlaborintojn kaj kunlaborontojn pro ilia donaco, eĉ la plej malgrava.

Ni do klare mencias, — kaj tion estonte regule faros —, la envenontajn donacojn kaj pagojn :


G-roj Maurice Jaumotte-Loquet	50.000 fr.
Belga Esperanto-Federacio	25.000 fr.
G-roj G. Debrouwere	5.000 fr.
Antverpena Grupo « La Verda Stelo »	2.000 fr.
S-ino R. Lecat (1/10 de 10.000 fr.)	1.000 fr.
Al kiuj ni aldonu : unua rentumo : « Sonorilo »	787 fr.

Ĉiuj, kiuj deziras kontribui, povas ĝiri sumojn al la P.Ĉ.N" 16.34.34 B.E.F. Gento; kun la mencio : « Fondaĵo por la Propagando : Jaumotte ».

La grava internacia turista asocio « La Naturamikoj » festas en ĉi tiu jaro la jubileon de sia 70-jara ekzistado. Pro tiu evento estas eldonata festbroŝuro en la lingvoj angla, franca, germana, nederlanda, kaj ankaŭ en esperanto. La prezo de la broŝuro estas proksimume 4 steloj.

Mendu la festbroŝuron se eble ĉe la grupo de la Turista Asocio « La Naturamikoj » en via urbo. Insistu ke vi deziras la eldonon ESPERANTLINGVAN. Se vi ne konas la adreson de via loka grupo, mendu rekte ĉe :

ATB « De Natuurvrienden »	Les Amis de la Nature
Provinciestraat 53	23 Bd. de l'Empereur
Antwerpen	Bruxelles



oostende

47-a kongreso de B.E.f.

5-6-7/6/1965

4-a markola kongreso

pentekosto

ENKONDUKO :

Tiu kongreso prepariĝis sub nefavoraj aŭspicioj : la LKK-anoj, krom unu, ne vivis en la kongresurbo kaj loĝis eĉ en diversaj regionoj. Kontraŭ ĉiu antaŭtimo, la Ostenda Kongreso plene kaj brile sukcesis. La multnombraj partoprenantoj travivis tri variajn interesajn agrablajn kongrestagojn !

Prosperis al la LKK vekli la interesigon kaj ricevi la aktivan kontribuon de la urbestraro. Kutime ni fieras pro oficiala akcepto de kongresanoj en urbodomo. En Oostende ni povis trifoje fieri kaj ekĝoji, ĉar trifoje la kontaktoj kun la urbestraro estis afablaj, kvazaŭ amikecaj, en sincera entuziasmo.

La kongresejo mem — en la urba festpalaco — liveris praktikan luksan kadron por la diversaj aranĝoj, kiuj disvolviĝis en perfekta ordo. Tio ebligis fruktodonan laboron.

La ŝipa ekskurso, la bankedo, la balo, sed ĉefe la lunda tuttaga aŭtoĉara promenado en la Bruĝa regiono, disvolviĝis en plej entuziasma atmosfero. Klara eksplika teksto el la kongresa dokumentaro estis bona preparo al la kulturriĉaj komentoj en la diversaj ekskursaj lokoj.

La 4-a Markola Kongreso, harmonie enmiksita en niaj federaciaj aranĝoj, donis la vere internacian karakteron al nia 47-a Belga Kongreso.

Resume : bonega, sukcesplena, impona manifestacio de nia esperantista movado !

1) Luksa Dekoro.

Kiam la multnombraj gekongresanoj alvenis en Oostende, ili povis imagi grandan mondurbegon pro la svarmado de turistoj en tiu plena sezonoparto kiu estas la Pentekostaj tagoj. Sed verŝajne ankoraŭ pli imponis la ejo de la kongreso mem, la festpalaco. Granda kaj luksa. Spaca por ĉiuj okazantaĵoj. Molaj tapiŝoj. Pezaj drapaĵoj. Inundo da lumo de la kristalaj lustruoj. Stilaj seĝoj. Vera plezuro por la okuloj... kiom pli granda plezuro ke ni povas kongresi tie ! Ĝi plialtigis kaj la prestiĝon kaj la valoron de la kongreso. Jes ni rajtis iom imiti la universalan... kaj nomi la grandan salomon « Zamenhof » kaj la malpli grandan « Witterijck » (= Bruĝa pioniro de Esperanto). Kaj ĝi faris ĉion pli impona : la malfermo, la balo, la festeno, ĉio. Jen inda ejo por inda kongreso !

2) Simpatia kaj petolema urbestro !

Kutime ni estas oficiale akceptataj de la urbestraro dum niaj kongresoj. Foje la urbestro mem faras tion. Sed ofte ankaŭ ni devas

kontentiĝi per iu(j) skabeno(j). Nun la urbestro faris. Kaj kia urbestro ! Kaj kiamaniere li faris ! Tio longe restos en la memoro ! Li atingis ke ni tuj sentis nin hejme. Ankaŭ la atmosfero estis tuj gaja kaj feliĉiga. Li volis mem malfermi la ekspozicion. Li volis ankaŭ alparoli nin parte en nia lingvo. Li volis mem akcepti nin oficiale. Post la kutimaj paroladetoj, li parolis kun ĉiuj, bonkore ; trinkis kun ni, ŝercis ! donis eĉ kisojn ! kaj mem gvidis nin tra la belega urbdomo pri kiu li prave fieras. Siajn klarigojn li ilustris ! ekzemple en la kunveno de la konsilantaro li ne nur klarigis la aparataron, sed provigis ilin de nia prezidanto, jen lasante lin paroli, jen forprenante de li la parolon ! Se jam iu urbestro meritas nian dankon, tiam certe la ĉarma sinjoro Jan Piers, de nia bela Oostende ! Eble li mem ne konscias en kiel alta grado li sukcesigis nian kongreson.

3) « Frapi kaj resanigi » ... la prezidanton (!)

Nia ĝenerala prezidanto havis la agrablan taskon prezenti la ekspozicion. Por multaj tio estus ŝarĝo ; sed ne por li.. Poste li devis prezidi la administrantaran kunvenon. Ankaŭ malgravaĵo por li, kun lia kompetenteco kaj aŭtoritateco. Sed kiu povis antaŭvidi ke tiu kunveno tiel fusiĝos ? La tagordo menciis : peticio ; J.I.K. ; instruado kaj la revuo. Rilate al tiu lasta, oni nete disigus la materian flankon dis de la enhavo. Sed tuj oni miksis ambau kaj disput(eg)is nur pri la enhavo. Je momento la interparolado estis akra. Kaj nia prezidanto estis je iu momento « frapita » ; certe pli, sekve de interna doloro. Tiu fakto konsternis nin ĉiujn. La kunveno finiĝis en konfuziĝo.



Sed estis denove ridante kaj fortega prezidanto kiun ni vidis en

la oficiala malfermo. La postan tagon, dum la ĝenerale jarkunveno, la kongresanaro pruvis ke ĝi ne forgesas la grandegajn meritojn de S-ro Jaumotte. Okazis tiam malgranda, sed iom kortuŝa ceremonieto, kiam geknaboj Dirk Maertens kaj Hilde Lauwers donis florojn al gesinjoroj Jaumotte-Loquet, kaj kiam s-ro Gr. Maertens prezentis la oran libron de la fondaĵo, kiu portas la nomon de nia prezidanto, sekve de lia mona donacego. Tiuj tagoj havigis al vi ankaŭ kelkajn emociojn, ĉu ne, kara sinjoro prezidanto ? ! Rilate ankoraŭ la malfermon ni diru ke ni aŭdis la kutimajn salutojn kaj ... la iom folkloran antaŭvenon kaj alparolon de fraŭlino Terrijn ! En la nomo de la urbo ĉeestis sinjoro Miroir, kiu siamaniere solvis la lingvan problemon salutante en kvar lingvoj.

Por la ĝenerala kunveno kiun ĉeestis ĉirkaŭ 70 personoj ni ankoraŭ menciuj ke la grupo « Paco kaj Justeco » de Brugge gajnis la premion Jennen » ; ke oni kolektis monsumon de 2.269 fr. kaj ke por la peticio atingis plej belajn rezultatojn Antverpeno kaj Verviers. Sekvas Brugge.

4) Antaŭenmarŝas ... junularo !

Kiom da fojoj en la pasinteco ni aŭdis ke niaj kongresoj similas al kunvenoj de ... pensumitoj ! Tiu tempo estas feliĉe for. Pli en la oriento, sed ankaŭ en okcidento, ni konstatas kreskantan nombron da junaj partoprenantoj. Kia estas la situacio ĉe ni ? Ni ne dubas ke estis agraba surprizo kiam je la malfermo, tiun sabaton, vespere, subite, neatendite, enmarŝis granda vico da gejunuloj de la Bruĝa grupo « Paco kaj Justeco ». Salutis Fino Randi Roose, vicprezidantino, kaj Paul Blondelle, la prezidanto. Ili partoprenis ankaŭ la gajan dancadon, vespere. Dua lumopunkto estis la festparolado dum la ĝenerala kunveno. Denove junulo supreniris la podion kaj kaptis nian atenton per tre ideoriĉa parolado. Li estas la tre vigla ĝenerala prezidanto de Esp.-junularo en nia lando : Ivo Durwael.

5) Ne rekomencita labora : ekspozicio.

Tiu ekspozicio estis tre interesa kaj tre bela. Ankaŭ ĝi pliimponigis nian kongreson. Speciale atentinda estis la kompleta kolekto de esperantaj poŝtmarkoj. Tio kostis multe da mono kaj ankoraŭ multe pli da streĉa serĉado de amiko Roger Iserentant. Sed dum nur du tagoj tiu ekspozicio povis esti malfermita. Sekve, malgranda nombro da personoj (se ni ne kalkulas la kongresanojn) povis admiri, jes admiri ĝin. Efektive, apud la menciitaj poŝtmarkoj, estis la riĉega kolekto de literaturaj, sciencaj, porinfanaj, turistaj libroj kun kelkaj tre luksaj eldonoj kaj aliaj tre allogaj eldonoj, kiel ekz. tiuj de « Stafeto ». Plie estis la multaj, trafaj pankartoj. Multegan dankon ni ŝuldas al la Antverpenanoj kaj al s-ro Iserentant, kies partepreno en la kongreso estis konstanta deĵoro. Sed ni scias ke li faras tion kun plena oferado. Ni esperu ankaŭ ke la kelkaj neesperantistoj kiuj vidis ĝin, rakontos al aliaj pri ĉio kion ili rimarkis.

Ni menciuj tie-ĉi ankaŭ ke la sabata vespero estis agrabligita de « ventroparolisto » S-ro Weber el Middelburg (Nederlando). Li faris bonege kaj precipe humorplene. La lasta punkto de tiu vespero estis

iu « konkurso pri klereco kaj lerteco » kiun organizis la festdirektoro de « Paco kaj Justeco » S-ro André Dumarey. Tion partoprenis Franca, Angla, Valona kaj Flandra grupoj. De la komenco ĝis la fino, ĉio estis interesa kaj kaptanta. Gajnis... la Valona grupo! La Flandroj ĝoje donis al ĝi la premion.

6) Batalema kaj romantika (juna) maljuna fratulino!

La lundo estis la ekskursata tago. Kien ekskursi en la tiel bone konata regiono de Oostende kaj Brugge? Tamen ni trovis la solvon. Unue al la Permeke-muzeo en Jabbeke. Antaŭ la alveno, la partoprenantoj povis legi kelkajn notojn en sia mapo. Poste ni tagmanĝis en la bela kaj pitoreska restoracio, la estinta abatejo « Ter Doest » de kiu, cetere, restas grandega grenejo. Ankaŭ pri tio estis notoj en la kongresa mapo. Poste ni iris al la estinta granda urbo, sed nun vilaĝo Damme. Tie, malfeliĉe la pluvo disirigis la kongresanojn, tiel ke nur malgranda nombro vizitis la interesan urbdomon kaj aliajn vidindaĵojn. Lasta ekskursopunkto: la grafa kastelo de Male. Krom la notoj, ni tie ricevis klarigojn de fratulino. Tion lastan ni plej ĝuis kaj certe ne rapide forgesos. Tiu tre vigla fratulineto, kun la ruĝaj vangoj, bonege konas la historion de la kastelo kaj de la Flandra popolo... kiun ŝi amas. Kaj tio estas ja tute natura. Kun multaj detaloj, pruvitaj kaj nepruvitaj (!) ŝi kun fervoro rakontis pri la brava Flandra popolo kaj ĝia batalo. Ne multe da tempo ŝi lasis al la tradukanto, kaj, ho mirinde, kiam tiu lasta forgesis en la lavango de faktoj, iun detalon, ŝi tuj memorigis tion al li!!! Ĉu en tiuj momentoj la Sankta Spirito komprenigis al ŝi Esperanton?! Estas preskaŭ ne alia ebleco! Tio estis vere la krono sur la tuta laboro de la kongreso! Iĝis urĝa tempo por foriri. Kien? Al la kunveno de la menciita junulara grupo. Tie ni gustumis ankoraŭ trinkaĵon kaj manĝeton. Tie ni aŭdis la lastajn paroladetojn, la adiaŭojn. La kongreso estis finita.


Konkludo:

La riĉa sinsekvo de tiuj interesaj aranĝoj tamen ne sufokis la vivon de la kongresanoj. La LKK lerte kaj meritplene lasis inter la kunsidoj, akceptoj, ekskursoj, manĝadoj, la necesan tempon por plene ĝui la sorĉan etoson de la Reĝino de nia belga marbordo.

Pri la venonta kongresloko, la Administrantaro saĝe decidis rompi la tradician sinsekvon inter flandraj kaj valonaj grupoj. Estos elektata la urbo, kiu pretas organizi kongreson. Venontan jaron ni kongresos en Loveno. Dezirinde venos en 1967 Charleroi. Nia jubilea 50-a Belga Kongreso povus okazi en ĉefurbo Bruselo.

Niaj geamikoj en Loveno ne estas multaj, sed kun bela entuziasmo ili jam preparas sin akcepti nin venontjare. Ni aliĝu amase por la Lovena rendezuo!

Por fini, decas ke ni publike danku kelkajn geamikojn kiuj havas grandegan meriton rilate tiun kongreson. Unue al la tuta L.K.K. kun precipe S-ro Marmenout, kiu ĉiuforte devis vojaĝeti, F-no Poupeye kiu



Parto de la kongresanora antaŭ la urbdomo.

aranĝis la delikategan monaferon, Fino Willems kiu multe skribis kaj kopiis, S-ino Roose-De Kersgieter kiu veturis multe, same kiel la ne-LKKano S-ro Roger Lauwers; kaj al la aliaj kiuj estas en la raporto menciitaj. Inter la Antverpenanoj meritas nian grandan dankon S-ro Verstraete pro pluraj veturoj de sia urbo al Oostende.

Dr. P. D. kaj Drs. F. R.

Proksiman jaron ni kongresos en Loveno

Dum la bela Kongreso en Ostendo, estis decidate, ke la Belga Kongreso okazos, proksiman jaron, en Loveno.

S-ino Meurrens tuj akceptis nome de la Lovena Grupo kaj, en nia proksima numero, ni publikigos jam kelkajn unuajn detalojn pri ĝia organizo.

Nun jam tamen, S-ino Meurrens informis nin, ke ŝi antaŭvidas kelkajn malfacilaĵojn rilate al la loĝado, pro la fakto ke, samtempe, ankaŭ okazos en Loveno alia, laŭnombro pli grava, kongreso.

Ŝi tial urĝe petas tiujn, kiuj iam nun certe scias ke ili partoprenos, ke ili bonvolu informi ŝin pri siaj deziroj rilate al loĝigo.

Tiu anonco, farita tiel longtempe antaŭ, ne tute firme devigos la mendintojn, sed ebligos tamen la organizantojn formi al si ideon pri la farotaj paŝoj.

Do: Tiuj, kiuj intencas peti loĝigon pere de la L.K.K., bonvolu, NUN JAM, averti S-inon Meurrens, Naamsestraat, LEUVEN.

« EUROPO »

« Eŭropo » estas la nomo de nova revuo, eldonita de societo « Europa één », kies sidejo estas Prins Boudewijnlaan 323, Wilrijk.

Tiu ĉi beleta revuo, kies unua numero aperis antaŭ kelkaj semajnoj, kostas nenion al la Esperanto-movado. Ĝi estas eldonita de tiu Societo, kiu propagandas la ideon pri unuigita Eŭropo kaj kiu, jam en sia propra nacilingva organo aperigis diversajn artikolojn pri nia lingvo.

Estos tamen evidente ke tiu eldono de organo speciale en nia lingvo ne estos daŭrigata, se evidentigus ke la esperantistoj mem ĝin ne bezonas..... Kaj tiu « bezono » estas montrebla nur per la fakto ke sufiĉe grava nombro de samideanoj abonu ĝin.

Tial ni volonte anoncas la aperigon de tiu nova Revuo aldonante, kun varma rekomendo, la kondiĉojn de abono: B. fr. 50 ĝirotaj al P.C.Nº 61.59.31 de « EUROPA EEN », Wilrijk.

Ni volas ankoraŭ aldoni ke, se tiu revuo estas eldonita de belga organizaĵo, ĝi tamen sin turnas al la « Eŭrop »-anoj en ĉiuj landoj kaj ke la enhavo sin direktas al kiel eble plej larĝa publiko.

KORESPONDANONCO

Mi estas junulo el Rumanio 23-jara kaj mi volas korespondadi kun junulo en via lando pri:

— Facila kaj popola muziko — geaktoroj — Bela koloraj bildkartoj.
Niky Bakrya, BUCURESTI O.P. 25. - Str. Otetului 49, ROMANIA.

NIA PETICIO AL U.N.O.

Kiel niaj membroj jam scias, U.E.A. decidis organizi, okaze de la Jaro de Internacia Kunlaboro, duan peticion al U.N.O.

Ĉiuj Grupoj kaj multaj individuaj membroj, jam de pluraj monatoj, vigle kunlaboras por ke tiu Peticio iĝu sukceso.

Kaj antaŭ kelka tempo la statistikoj montris ke se Germanujo akiris ĝis nun la plej grandan nombron de subskriboj, Belgujo tamen estas ĉu la dua aŭ tria, laŭ absoluta kalkulo.... Sed ke ĝi eble estus **la unua en la vico**, se oni kalkulus la subskribojn, kompare al la enloĝantaro de la diversaj landoj!

Ja ne gravas, kiu estos fine la unua aŭ la dua en la Honora Kolono de la kunlaborintoj al tiu nia agado.... Kio gravas, kio gravegas estas ke nia dua Peticio estu ankoraŭ pli impona, pli sukcesplena ol tiu, kiun ni organizis antaŭ kelkaj jaroj kaj kiu havigis al ni la rajton esti en daŭraj, konstantaj rilatoj kun UNESCO.

Tial ni devas kapti la okazon, prezentitan al ni per la daŭrigo de kolektado de subskriboj **ĝis la fino de la jaro** por fari ankoraŭ lastan, sed efikan klopodon.... Ke tiuj, kiuj jam laboris, **daŭrigu**.... Sed precipe ke tiuj, kiuj nenion jam faris, vekigu kaj pripensu ke malsukceso, eĉ rilata, estus katastrofa por nia movado, ĉar niaj malamikoj certe ekspluatus kruele la situacion.

Sed ne plu eblas ke iĝu malsukceso.... Sed necesas ke ĝi iĝu **vera demonstracio de nia forto!**

Ekrapidu do: Petu foliojn, se vi jam ne havas. Plenigu ilin, se vi jam posedas, sed ne jam eklaboris!

FIRMA VAN ISEGHEM & VERSTRAETEN

P. V. B. A.

St.-Bernardse steenweg 631
Hoboken

Vitraloj — Speguloj —
„securit“ vitro
kolorigitaj vitroj
alumintaj senmastikaj
stangoj por kupoloj

Vitro-cemento por
tutvitro-konstruaĵoj
mastiko
telefono 37.88.20

« Paco kaj Justeco »
Brugge kaj ĝia junulargrupo.

Se la plenkreskuloj ne multe kunvenis dum la du someraj monatoj — ni devas escepti la Volley-balludadon, ĉar tio daŭris tre tre regule — la gejunuloj ne ripozis. Post ĉiuj dekkvar tagoj ili kunvenis dimanĉmatene. Dum multaj merkredoj ili faris komunan ekskurson. Kaj ekster tio, ili ankoraŭ okaze kunvenis. Ekzemple belega tago estis la 11a de julio, kiam ili kunvenis en Knokke, malgraŭ tre duba vetero, kaj iris kun kelkaj de la plenkreskula grupo, laŭlonge de la maro al Kadzand en Nederlando. Tie ili multe ludis kaj manĝis. La dimanĉaj kunvenoj estis amuzaj kaj instruaj. Bonega estis la cerbogiĝnastiko sub gvidado de festdirektoro A. Dumarey. Tre instruaj estis la enigmoj prezentitaj de R. Iserentant. Tiu kunvenserio komenciĝis per parolado de F. Roose. Li akcentis kion esperanto povas doni al la junularo kaj kion ĝi povas doni al la movado. Li situis esperanton en la kadro de la sociaj movadoj kie ankaŭ junularo povas trovi lokon kaj idealon. Li donis firman idean bazon. Multaj gejunuloj jam korespondas. Estis ankaŭ surprizo kiam delegitaro de tiu grupo prezentigis dum la malfermo de la Kongreso de Belga Esperanto-Federacio en Oostende.

PAROLEROJ

En Februaro kaj Marto, malrapidis la evoluo de niaj kunvenoj pro la mal sano kaj morto de la 80 jara patro de la prezidantino kaj poste pro la malfacila translokiĝo de la sekretario.

En Aprilo okazis tre interesa debato pri la vivo en popola respubliko ĉekoslovaka, pere de bildoj kaj feriaj memoraĵoj. S-ro Gauthier teknikisto ĉe ACEC, vizitis plurfoje tiun landon kaj

KORESPONDANONCOJ

- 1) F-no Radianna Popova, str. « Kudoĝlu » 10 Plovdiv Bulgarujo. 19 jara studentino en Germana filologio.
- 2) Kristo Cvetanov Gjulín, str. Janko Zabunov, 12-A Sofia Bulgarujo. Tre ŝatas muzikon kaj la naturon. Konas la Francan lingvon.
- 3) Rubens NSAYI Quartier Mongo 30-A Leopoldville/Matete Rép. du Congo. Deziras korespondi.
- 4) Jakaŝi Jai, 108, Zéooome Kasuga - ĉoo, Sizuoka-ŝi. Sizuokaken Japanujo. Serĉas korespondantojn en Belgujo por junaj geknaboj.

GRUPA VIVADO

tre ĝuste komprenigis la senĉesan evoluon de la vivmaniero kaj konceptoj de ĝiaj loĝantoj.

Alian semajnon, Fino Guilbert, nova lernantino, invitis kelkajn Esperantistojn vidi ŝian filmon traktantan pri la naskiĝo de birdoj kiujn ŝi filmis kun ega pacienca.

Dimanĉon 25an, S-ro Pouillard gvidis nin tra Binche. La partoprenantoj vizitis la urbeton, ĝian kanonikan preĝejon kaj mirindajn remparojn.

En Majo S-ro Devillez parolis pri la Jaro de Kunlaboro. Tiu kunveno estis kompletigita per 60 diapozitivaj dediĉitaj al nia Nigra Lando. Ili montris en helaj kaj gajaj koloroj kelkajn agrablajn angulojn de nia regiono.

Ni devas konfesi ke la karloreĝa partopreno al Nacia Kongreso de Ostendo bedaŭrinde estis malimpona. La 17an Fino Orsolini prezentis raporton pri tiu bela Kongreso kaj poste montris 200 lumbildojn prenitaĵojn dum vojaĝo tra la Dolomitoj.

La 26/27an de Junio devas okazi la « Esperantista Semajfino de Karloreĝo. Esperantista semajfino de la 26a/27a de Junio

Tridek personoj ĉeestis la vesperan prelegon dediĉitan al la romanstila arkitekturo en Francujo. Ĉiuj admiris la vere interesan kolekton de kolorbildoj klujn la konata pentristo M.-E. Clart komentis tre agrable kaj sperte.

Dimanĉon matene amika rondo disdonis premiojn al la infanoj kiuj pli malpli sekvis la kursojn de S-ro Delforge, en Lobbes. La suno brilis kaj la disdono okazis sur la verda herbejo de lia landbieno, kun la amika partopreno de du oficialuloj de la urbeŝtaro.

Post la tagmanĝo, oni surgrimpis la belfridon de Thuin (17a jarcento) kaj la veturiloj kondukis nin ĝis Solresur-Sambre, kie oni vizitis ĝian belan kastelon de la 11a jarcento.

La romana ponto de Montignies-St.-Christophe estis ankaŭ vizitata kaj ni revenis al Karloreĝo laŭ vojoj kiuj pruvis ke nia nigra lando estas ankaŭ agrabla verda regiono kun larĝaj panoramoj.

JARO DE INTERNACIA KUNLABORO

Ni ne plu klarigos al vi, eĉ ne memorigos, ke la nuna jaro estas samtempe « Jaro de Internacia Kunlaboro » speciale por la Esperantistoj.

Ni volas nur mallonge alvoki la Grupojn por ke, ĉiuj senescepte, dediĉu kelkajn el la kunsidoj de la lasta monatrío al temoj, kiuj iel rilatas al tiu ideo: Estas la Homaj Rajtoj, la Malsato en la Mondo, la Internacia Kunlaboro, kiel ajn kaj multaj aliaj temoj, por nur citi kelkajn.

Kaj ne forgesu sendi unu ekzempleron de la ĵurnaloj al nia ĝenerala sekretario; unu al la C.O. de U.E.A. kaj, certe, unu al UNESCO, kiu nepre devas vidi, ke la esperanta movado interesiĝas pri la « Jaro de Internacia Kunlaboro » kaj ke ĝi povas esti bona he lpilo por propagandi la ideojn kaj planojn de UNESCO mem.

JARKUNSIDO DE BEJA

La 6-an de junio, je la 9-a matene jam, BEJA havis sian jarkunsidon en la programo de la Belga Kongreso en Oostende. Neniam ĉeestis ĝin tiom da gejunuloj: tre ĝojiga fakto!

La kasistino — F-ino Ingrid Maes — per sia raporto sciigis al ni ke ni NE havas deficiton, kiel la pasintan jaron je la jarkunveno. Sed aliflanke, niaj enspezoj por 1965 estos malpli grandaj!

El la jarraporto de la ĝen. sekretario — Roger Van Humbeeck — mi resumas jenajn ĉefajn punktojn:

1) BEJA petis subvencion al la Nacia Servo por la Junularo.

2) Post la kongreso de Wégimont, BEJA organizis ankoraŭ tutlandajn renkontojn en

— Liège — Visé (24 - 25.X.1964) kaj en

— Namur (20 - 21.III.1965)

3) BEJA-anoj partoprenis al

— la 20-a Int. Jun. Kongreso en Amsterdam, kaj al

— la 8-a Int. Seminario de G. E.J. en Nürnberg.

4) BEJA havis kontaktojn kun jenaj Esperantistaj organizaĵoj: BEFA, LAF, SAT-junularo, SEL, STELO, TANEF.

5) Lokaj sekcioj :

Lokaj sekcioj de gejunuloj esperantistaj ekzistas en :

Erembodegem — gvidas S-ro De Wit

Liège : « La juna Vivo » — gvidas Serge Denoël

« Lièga Esperantista Grupo Universitata » — gv.
Jeanine Chaîneux

Brugge — gvidas Paul Blondelle

Verviers — gvidas S-ro Van Breuse

Wilsele — gvidas F-ino Van Meensel

Post la raportoj venis la ĉefa punkto de la tagordo : elekto de nova estraro. Ĝi ne estis fre facila, ĉar montriĝis ke, pro teknikaj malfacilaĵoj, 2 el la elektitaj personoj ne povis plenumi sian taskon. Lunde, la malnova estraro denove kunvokis ĉiujn gejunulojn ; kaj ĉiuj aprobis jenan disdividon de la taskoj :

Prezidanto : Serge DENOEL, rue V. Raskin, 20, Liège

Ĝen. Sekr. : Ivo DURWAEL, Dolfijnstr. 77, Antwerpen

Kasistino : Yvonne POUPEYE, 11-julistr. 11, Brugge

Vic-Prez. (franclingvanoj) : Jeanine CHAINEUX, rue des
Plantes 10, Verviers

Vic-Prez. (nederlandlingv.) : Ernest LERNOUT, H. Kruisstr.
11, Mortsel

Sekretariino (nederlandlingv.) : Randi ROOSE, St.-Klara-
dreef 59, Brugge

Sekretario (franclingvanoj) : André HECK, rue haut Vnave
36 Jalhay.

Anstataŭantinoj : F-inoj Ingrid MAES kaj Maria COOREMAN.
Provizore ili estas komitatanoj, sed apartenos al la estraro
tuj post forfalo de iu estrarano.

S-ro De Wit akceptis fariĝi Komitatano por Erembodegem.

Ivo DURWAEL

La Kvindeka Kongreso Universala de Esperanto en TOKIO

Dum la semajno de la 1.8.1965 ĝis la 7.8.1965 nia radiostacio menciis diversfoje la 50-an kongreson de U.E.A. en Tokio, kiu okazis, por citi nur unu nomon, sub la alta protekto de Prof. D-ro Yuji Shibata, Prezidanto de la Japana Akademio kaj en kiu partoprenis preskaŭ 2.000 gekongresanoj, el 44 landoj.

La kongresejo estis la oka etaĝo de la konstruaĵego NOOKJOO BILU, konstruita supre de la stacidomo Ōtemachi de la subtera fervojo, kaj la kongreso malfermiĝis tie en la salono Zamenhof, per interkona vespero, sabaton la 31.7.1965. La inaŭguro, dimanĉe, tamen okazis en alia salono, en la Ueno-parko.

La multaj kongresaj laboroj komenciĝis la lundon, 2.8.1965 i.a. per la inaŭguro de la Internacia Somera Universitato.

Laŭ-ehave, tiu prelegserio de la I.S.U. estas unu el la plej elstaraj ĝis nun okazintaj, kaj certe por iuj valoras la penon por akiri la tekstojn.

La Unua Ĝenerala Kunveno de UEA, kiu ankaŭ okazis dum tiu lundo 2.8.1965, pritraktis la raporton de TEJO, sub prezidanteco de D-ro C. Minnaja, kaj akceptis la salutojn de la fakaj organizaĵoj, sub Prezidanteco de S-ro E. Carlen. La dua ĝenerala kunveno de UEA, kiu okazis, la vendredon, pridisputis la estraran kaj fakajn raportojn.

La laborsekcioj I kaj II aliflanke, kiuj raportis dum la ferma kunveno, sabaton matene, pritraktis respektive la jenajn temojn, tre karajn al ni :

- a) jaro de la Internacia Kunlaborado ;
- b) ĉefprojekto de UNESCO « Oriento - Okcidento » ;
- c) la lingva problemo en la internaciaj ekonomiaj rilatoj.

La gekongresanoj ĉi-jare ne povis admiri la geaktorojn de la kutima grupo « Internacia Arta Teatro », sed la ludintoj kaj la enhavo de la prezentita dramo en Tokio plene kontentigis la vizitintojn : « La Teatro Populara » de Lodz kun la dramo « Katakai - Malamiko » ; ĝi tamen nur ludis por la oficiala teatra vespero, kaj do mankis al la internaciaj teatro-amatoroj la okazon por ĉeesti suplementajn prezentadojn, kiel ili jam kutimis dum multaj antaŭaj kongresoj.

La jaŭda tago ankaŭ en Japanujo estis dediĉita al ekskursoj. Por doni al la eksterlandaj kongresanoj la eblecon kiel eble plej multe profiti de la restado en la fora lando, la kongreso organizis duan ekskurson tuttagan la 8.8.1965. La vizititaj lokoj, Nikko kaj Hakone situigis en la apudeco de Tokio, sed kombinis la regionan belecon al arkitekturaj mirindaĵoj.

La postkongresa ekskurso okazis en la urboj Kioto kaj Nara, ambaŭ reprezentaj malnovaj urboj, tute kontraste kun la mamuta urbego Tokio, en kiu la gekongresanoj devis dum unu semajno vivi.

Krome okazis komprenble ankaŭ la kutimaj programeroj : la balo, la bankedo, la tre diversaj kunvenoj de fakaj grupoj, la oratora kaj la belartaj konkursoj, la tutspeciala infana kongreseto, la 21-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO, la komitat-kunveno k.t.p.

Por la plimulto de nia membraro, la ĉeesto de la Tokia kongreso ne estis ebla ; sed F-ino J. Terrijn, nia kasistino, salutis dum la inaŭguro, nome de ni ĉiuj, anoj de BEF, kaj nome de la Ministro por Edukado kaj Kulturo parolis Prof. Vanbreuse.

* * *

Budapeŝto 1966, tiu kongreso estu ek de nu nia celo, kaj ni povas certigi al vi ke tiu ĉarma urbo posedas unikan atmosferon por plene sukcesigi la aranĝojn de la Universala Kongreso.

Menciinde estas ke nia sekretario S-ro G. Maertens, organizos, sub la aŭspicioj de BEF, karavanon de tri semajnoj al Budapeŝto, forirante tra Germanujo, Ĉeĥoslovakujo (Tatra Montaro) kaj revenante post la semajno en Budapeŝto (kaj Hungarujo) laŭ Vieno, Königsee kaj Salzburg, dum nia Ĝenerala Prezidento, S-ro M. Jaumotte, kiu estas la Prezidanto de la « Internacia Esperanto-Klubo aŭtomobilista » organizos aŭtoralion, kies partoprenontoj do kune veturos al Budapeŝto.

THE HISTORY OF THE

of the ...

of the ...

of the ...

of the ...

of the ...

of the ...

of the ...

of the ...

of the ...

of the ...

of the ...